

Esencaj Demandoj pri la Vivo

Plurfoje kiam vi serĉas la feliĉon, vi konsideras la signifon de la vivo. Vi serĉas en via memoro ian komencon. Vi sendas antaŭ vi viajn pensojn serĉante orientiĝon. Sed ĉio, kion vi vere konas, estas hodiaŭ, kaj vi perdiĝas en la nuna tempo.

Kiu mi estas? Kiel mi estiĝis? Kaj la tempo, kien ĝi min alportas? Ĉu al la morto? Do, el kie mi devenis?

Por kompreni kial vi estas ĉi tie, vi devas unue kompreni vian originon. Kiam vi naskiĝis, vi ne ekvenis el la nenieco al la ekzisto. Vi ĉiam vivis. Dum via antaŭtera vivo vi loĝis kun via Ĉiela Patro. Tie, kiel spiritaj gefiloj de Dio, vi vivis ĝis vi pretis veni al la tero. Kiel diris la poeto Wordsworth:

Sonĝo kaj forgeso estas nia naskiĝo.
Nia animo, la stelo de la vivo,
estis kreita en alia sfero,
el malproksima firmamento ĝi alvenis.
Ĝi ne alvenis en nepra forgeso sen
memoro, el la ĉeesto de Dio,
kie estis nia antaŭloĝejo,
sed gloraj nuboj estas ĝiaj vestoj.

Kiam vi eniris la tervivon, malaperis el via memoro ĉia memorigaĵo pri via antaŭtera vivo; por ke vi vivu per la fido kaj pretigu vin por la eterneco. La fizika korpo, en kiu via spirito loĝas nun, estas submetata al doloro, al malfacilaĵoj kaj al morto. Estas per alfronto de problemoj, ke vi fortigas vian karakteron. Vi devas elkoni doloron por ĝuste taksi bonsanon, malfacilaĵojn por disvolvi kuraĝon, la morton por kompreni eternan vivon.

Do, ne gravas kiu vi estas, vi ne nur havas parencecon kun ĉiu persono kiu vivas, vivis aŭ vivos sur la tero, sed ankaŭ kun Dio, la Patro de ĉiuj ni, kaj kun Lia Filo, nia Savanto. Akceptine respondecon pri la tera vivo, vi ricevis mirindan korpon, kiu similas la korpon de Dio. "Kaj Dio kreis la homon laŭ dia bildo, laŭ la bildo de Dio li kreis lin; viro kaj virino li kreis ilin." La spirito kaj la korpo konsistigas la animon de la homo. Ĉu surprizas vin, kiu estas filo de Dio, ke vi estas eterna parto de Liaj Planoj kaj Celo? Kaj, devenante, de tia nobla familio, ĉu estas en vi mem kapabloj, kiuj superas eĉ viajn plej grandiozajn revojn?

Estu certa, ke via serĉado pri la feliĉo rilatas al inda celo. Estu certa, ke la vivo estas vivinda. La vivo ofertas al vi du multvalorajn donacojn. Unu estas la tempo kaj la alia estas via libera volo; la libereco por aĉeti per via tempo tion, kion vi volas. Vi havas la liberecon interŝanĝi vian tempon anstataŭigi ĝin per malaltaj deziroj. Vi povas investi ĝin en la avareco. Per ĝi vi povas aĉeti la vanecon. Vi povas dediĉi vian tempon al la akirado de materialaĵoj. Via estas

la libereco por elekti. Sed tio ne estas bonaĉeto, ĉar vi ne trovos per ĉi tiaj materialaĵoj daŭran kontentecon.

Alvenos la momento kiam vi devos raporti pri ĉiu tago, ĉiu horo, ĉiu minuto de la jaroj, kiujn vi pasigis en la karno. Estas dum ĉi tiu vivo, ke vi marŝas per la fido. Ni montras, ke ni kapablas elekti bonon anstataŭ malbonon, ĝustecon anstataŭ malĝustecon, veran feliĉon anstataŭ portempajn amuzojn, kaj via eterna rekompenco estos laŭ viaj decidoj.

Unu el la profetoj de Dio diris: "La homo ekzistas, por ke li havu ĝojon." Tia ĝojo, kiu inkluzivas plenan vivon; vivo dediĉata al la servo, la amo, la hejma harmonio, kaj la fruktoj de honorinda laboro, la akcepto de la Evangelio de Jesuo Kristo, de ĝiaj postuloj kaj ordonoj. Nur per tio ĉi vi povas trovi la veran feliĉon. Tia feliĉo, kiu ne malaperas kun la lumoj, la muziko kaj la popolamasoj.

Dio vin metis ĉi tien sur la teron sen ia memoro pri via antaŭtera pasinteco, sed li ne forlasis vin senesperaj aŭ sen fido pri postmorta vivo. Li promesis al vi la jenon: "Mi estas la releviĝo kaj la vivo. Kiu kredas al mi, eĉ se li estas mortinta, tiu vivos."

Unu el la faktoj pli amplekse atestataj de la Sankta Biblio estas la releviĝo de la Sinjoro Jesuo Kristo. Tri tagojn post lia krucumado la disĉiploj kunvenis, laŭ la historio de la Sankta Skribo: "Kiam do, estis vespero en tiu sama tago, la unua de la semajno, kaj kiam estis fermitaj la pordoj kie la disĉiploj kunvenis, Jesuo venis kaj staris meze de ili: "Pacon al vi." kaj dirante tion, li montris al ili siajn manojn kaj flankon. La disĉiploj do ĝojis, vidante la Sinjoron."

Same kiel vi vivis antaŭ via naskiĝo en la karno kaj kiel vi vivas en ĉi tiu vivo, per la amo kaj elaĉeto de nia Savinto, vi daŭre vivos post la morto. Ĉiu ano de la homa raso naskiĝas kaj mortas. Kvankam vi akceptas vian naskiĝon kiel naturan okazon, tamen la morto, la pordo nekonata, kiu kondukas antaŭen, ĉiam por la homo estas terura mistero. La plej peniga provo de la vivo ekvenas per la morto de unu el niaj gekaruloj. Kiam oni ne havas fidon pri la senmorteco de la animo, la disigo de la morto ŝajnas alporti nekonsoleblan malĝojon.

Post la morto, kvankam via fizika korpo restos tere, tamen via spirito, kiu estas eterna, daŭre vivos. Viaj memoroj pri la tera vivo restos kun vi, kaj vi denove rememoros vian antaŭan vivon. Kvazaŭ oni elirus malluman ĉambron al taglumo, per la morto vi pasos al loko de revekiĝo, kie vi trovos viajn gekarulojn, kiuj atendas por elkore bonvenigi vin.

Nun, vi estas ĉi tie sur la tero, sen iu ajn memoro pri tio, kio okazis antaŭe, kaj kun nur flustro de la fido por montri al vi kio postvenos. Havu la certecon, ke vi estas ĉi tie nek hazarde, nek akcidente sed kiel ero de glora kaj eterna plano. Per kvieta kaj paciga voĉo interne de vi kaj per la revelacioj al siaj vokitaj profetoj, Dio, Nia Eterna Patro, gvidas la aferojn de siaj gefiloj, hodiaŭ same kiel hieraŭ. En la jaro 1830, Dio restarigis sian Eklezion kaj restaŭris la plenecon de sia Evangelio por ke ĝi estu denove inter la homoj, per moderna profeto, Jozefo Smith.

Per revelacioj, nia Savinto Jesuo Kristo denove sciigis la planon de savo kaj ekzalto. La savo venas al ĉiu homo kiel donaco de Jesuo Kristo, sed le ekzalto, la plej alta el la eternaj benoj estas io, kion oni mem devas gajni. Ne sufiĉas, ke vi nur kredas je Jesuo Kristo. Vi devas labori kaj lerni, serĉi kaj preĝi, penti kaj pliboniĝi, elkoni la diajn leĝojn ke viv laŭ ili.

Tian estas la vojo al la paco kaj feliĉo kaj la pleneco de eterna vivo. Tia estas la vojo de nia Ĉiela Patro. Ni invitas vin esplori ĝin, elprovi ĝin, preĝi al Dio kaj serĉi kaj serioze pripensi. Elprovu ĉion, retenu la bonon. Nur se vi ne timas la veron, vi povas trovi ĝin. Kaj, ĝi kondukas al senlimaj benoj por vi kaj por viaj gekaruloj, ĉiam kaj eterne.

Do, jen via feliĉo; feliĉo multe pli profunda ol portempaj amuzoj; feliĉo, kiu superas la homan komprenon; feliĉo ne por la momento, sed por la eterneco. Ĉi tio estas la serĉado de ĉiu persono. Ĉi tio estas la celo de la vivo. Ĉi tio estas la ŝlosilo al la feliĉo, ĉar la Dio kaj Patro de ĉiuj ni diris: "Tio ĉi estas mia laboro kaj mia gloro - realigi la senmortecon kaj eternan vivon de la homo."